

КАВКАЗ **ESPERANTISTO**

კავკასიის ესპერანტიზტი

Дуонмоната literature kaj propaganda gazeto.
Двухнедельник.
Միփարարիքը.
ორკვირ. ჟურნალი

№ 12

1910 J. I JARO 30/17 de Oktobro

Kaukaza Esperantisto

Duonmonata literatura kaj propaganda gazeto.

Jarabono: 1 rub.—1.06 sm., duonjare 60 kop.—0,60 sm.

Tarifo por anoncoj: 1 paĝo—6 rub. (6,30 sm.), 1/2 pĝ.—3 r., 1/4 pĝ.—1 r. 50 k., 1/8 pĝ.—75 k., 1/10 pĝ.—50 kop. Adresoj de samideanoj nur 10 kop.

Adreso: Tiflis, Elizavetinskaja strato № 17, Hajk Ter-Astvaetranca.

Кавказский Эсперантистъ

Двухнедельный литературный и пропагандный журналъ.

Подписка: На годъ 1 руб., на 6 м. 60 коп.

Объявленія: Страница 6 руб. (построчно: строка петита 10 коп., передъ текстомъ 20 коп.)

Адресъ: Тифлисъ, Елизаветинская ул. № 17, Аяку Теръ-Аствацатранцу.

კავკასიის ესპერანტიზტი

ԴՐԱԿԱՆ ԵՒ ՊՐՕՊԱԳԱՆԴԱԿԱՆ ԵՐԿԵՆԱԲԱՐԱԹԵՐԹ

Բամնեգիքը՝ տարեկան 1 ռ., 6 ամիսը՝ 60 կոպ.

Յայտարարութիւններ երեսը 6 ռ., կէս երեսը 3 ռ., քառորդը՝ 1 ռ. 50, ութերորդը՝ 75, տասերորդը՝ 50 կ. Լաոցկէ՝ Քիֆլիս-Նիկոլայեանսկայա փ. № 17. Լայկ Տեր-Աստուածատրեանցի:

კავკასიის ესპერანტიზტი

ორკვირეული სალიტერატურო ღ საპროპაგანდო ჟურნალი.

წლიური ფასი 1 მ., ექვსი თვეთ—60 კაპ.

Редакция открыта ежедневно отъ 5—7 ч. вечера.

NAZO^{*}

(De Gogol)

«Efektive estas treege stranga afero!» diris la oficisto: «la loko estas tute glata, kvazaŭ ĵuselbakita flano. Jes, eksterordinare glata. Presi la anoncon ne estas granda afero», diris la oficisto: «sed mi nenian profiton antaŭvidas por vi: se vi volas, ke via afero havu sukceson, vi priskribu vian akcidenton al tiu homo, kiu scias bone skribi, por ke li povu poezie ĝin priskribi, kiel maloftaĵon el la homa vivo kaj poste presi ĉi-tiun artikoleton en «Severnaĵa Pĉela» „Norda abelo“ (en tiu-ĉi momento li reflaris la tabakon,) por utilo de l'ĵumularo, (ĉi-tie li viŝis la nazon aŭ simple, por komuna scivoleco».

Kolegia asesoro estis falinta en senliman malesperon. Li mallevis siajn okulojn en la gazetojn, kie estis presita anonco pri spektaklo; lia vizaĝo kvazaŭ fariĝis preta por rideto, kiam li tralegis nomon de konata aktorino belulino; li eĉ volis meti sian manon en poŝon, por scii, ĉu li havas bluan papermonon por aĉeti bileton en partero, ĉar laŭ lia penso stab-officiroj nepre devas sidi en teatro en la partero, sur apogseĝoj; sed subite unu penso pri la nazo estis sufiĉa, por ke li jetu siajn planojn.

Sajnis, ke mem la oficisto estis iomete kortuŝita de malbonsituacio de Koralen. Dezirante iomete plifaciligi la teruran situacion de Kovalev, la oficisto, farinte malgajan mienon, disis: «Al mi estas fre domaĝe, ke ĉi-tiu akcidento okazis kun via persono. Ĉu vi ne volas flari ĉi-tiun tabakon? Ĝi distras la kapdolorojn kaj revenigas al ĉiu homo bonan hnmoron.»

^{*}) Vidu la 9-an numeron da „Katk. Esp.“

Dirante ĉi-tion, la oficisto alportis la Kovalev la tabakujon, sufiĉe lerte kasiinte tabakujan kovrileton sub ĝi, sur kiu estis pentrita la portreto de iu sinjorino kun ĉapelo.

Ĉi-tiu neintenca agado de l'oficisto finigis la grandan toleremecon de Kovalev.

«Mi tute ne komprenas, kial vi nun tiel ŝercas» daris li: «Ĉu vi ne vidas, ke ĉe mi malestas nome tio, per kio oni flaras? La diablo prenu vian tabakon! Mi nun tute ne povas rigardi, kiel bonan tabakon tiel malbonan.» Dirinte ĉi-tion Kovalev eliris el la oficejo tre ĉagrenita kaj iris al privata kvartalestro.

Kovalev eniris lian ĉambiron nome tiam, kiam li sin eltiradis kaj diris al si: «Eh, bone mi dormos la du horojn!

Tiamaniere la alveno de kolegia oficisto estis tute ne ĝustatempa. La privata kvartalestro estis granda vigliganto de ĉiuj artoj kaj manufakturo; sed krom tio, li estis granda amanto de regna papermono.

«Nu, tute malestas io pli bona, ol ĉi-tiu objekto» ordinare parolis li, montrante al iu la papermonon: «Ĝi ne petas la manĝon, ne okupas grandan lokon, ĉar ĉiam trovas lokon por si en la poŝo, kaj arkorafi, se ĝin oni faligos, ĝi neniam rompiĝos.»

La privata kvartalestro akceptis nian Kovalevon tre seke kaj diris al li, ke post la tagmanĝo ne estas tempo por policesplorado, ke mem la homa naturo difinis, ke post la tagmanĝo la homo nepre devas malmulte dormeti; (al ĉi-tio, kolegia asesoro konkludis, ke privata kvartalestro konis la sentencojn de antikvaj saĝeguloj;) krom tio kvartalestro ankaŭ aldonis, ke de bona kaj konvenema homo, oni neniam ŝtelos aŭ deŝiros la nazon.

Ni devas noti, ke Kovalev estis tre

ofendigema homo. Li povis pardoni al ĉiuj ĉion, kion oni parolis pri Kovalev, kiel pri persono, sed li nemiam pardonis tiujn, kiuj parolis pri lia rango kaj deveno. Kovalev eĉ parolis, ke en ĉia teatra piezo oni povas ofendi la ĉef-oficirojn, sed la stab-oficirojn neniam.

La akcepto de l'privata kvartalestro tiel konfuzigis Kovalevon, ke li, balancante la kapon, diris: «Mi konfesas, ke poste tiuj-ĉi ofendigaj rimarkoj de via flanko, mi nenion povas aldoni...» Kaj eliris el la domo de l'kvartalestro. Li alveturis hejmen, malfacile spirante. Jam krepuskiĝis. Al li mom ŝajnis, ke lia propra loĝejo fariĝis tre abomena kaj malgaja. Enirinte en antaŭĉambron li ekvidis sian lakeon Johanon sur la leĝa, makulita kanapo, kiu, kuŝante sur la dorso, kraĉadis en plafonon, kaj ĉi-tion li faradis tre sukcese. Lia indiferenteco de l' homo, ekbestigis Kovalevon; li ekbatis Johanon per la ĉapo sur la frunton, dirante: «Vi, porko, ĉiam vin okupas per sensencaĵoj!»

Johano subite kaj rapide elalotis de sia loko kaj deprenis de Kovalev lian mantelon.

Enirinte en sian ĉambron, la majoro tre lacigita kaj krom tio malĝojita, sin ĵetis en la apogseĝon kaj fine, post kelke da ĝemoj li diris:

«Ho, mia Dio! mia Dio! Pro kio do venis al mi tiuspeca makeliĉo. Se mi restus sen la manoj kaj la piedoj—ostus pli bone; sed resti sen la nazo estas tre terure. Kion prezentas la homo sen nazo? Nur la diablo scias: li estas nek birdo, nek civitano, nek besto, ŝi, diablo, prenu lin. Pli bone estus, se, ĉi-tiun homon oni ĵetus ien, eĉ en abismon.»

Ho, iomete pli bone estas, se mian nazon oni almenaŭ detranĉus en ia militbatalo, aŭ en la duelo, aŭ alme-

naŭ mi estu la kaŝzo de ĝia foriro; sed, bedaŭrinde, ĝi perdiĝis ien tute vane, tute subite kaj neatende!..

Sed, ne, ne estas eble, aldonis Kovalev, malmulte pripensinte: «ne estas tute eble, ke la nazo povu foriri, perdiĝi. Ĉi-tio, eble, al mi nur ŝajnas en songo, aŭ mi nur nun revas; eble mi iamaniere trinkis la brandon anstataŭ la akvo, per kiu mi viŝas mian barbon post la razado kaj ĝi min ebrigiĝis.»

Por efektive ekscii, ĉu li estas ebria aŭ ne, Kovalev tiel pinĉis sin, ke li eĉ ekkruis de doloro. Ĉi-tiu doloro fine asertis lin, ke li tute ne estas ebria, kaj krom tio eĉ ne songas. Li malrapide aliris al spegulo kaj antaŭ ol enrigardi en ĝin li fermis siajn okulojn, pensante, ke elbe la nazo mem subite mantriĝos sur sia loko; sed en tiu-ĉi minuto li tute ektimigita desaltis reen, dirante:

«Fi, kia paskvila lidajo! Ĉi-tio estas tute ne komprenebla. Nu, certe, estus iomete komprenebla, se en mia domo perdiĝus aŭ butono, aŭ argenta kulero, aŭ horloĝo, aŭ io simila,—sed diablo prenu, mi perdis mian propran nazon, en mia propra loĝejo!.. La majoro Kovalev, konsiderante ĉiujn situaciojn de l'akcidento, supozis, ke kulpa en liu-ĉi nekomprenebla farigo estis edzino de stab-oficiro Podtoĉina, kiu volis, ke li edzigu je ŝia filino. Kvankam Kovalev amis amindumi kun ŝia filino, sed li tute evitis la difinitivan decidaferon, Kiam do Podtoĉina anoncis al li decide, ke ŝi nepre volas lin edzigi, Kovalev mallatente kaj malrapide elparolis iajn komplimentojn; li diris interalie, ke li ankoraŭ estas tre juna por esti la inda edzo, ke li devas ankoraŭ datriigi sian oficon je kvin jaroj pro tio, ke tiam li havos bonan agon—nome,—kvardekdujaran, kaj, certe, fariĝos tre bona edzo de laŭdinda

kaj aminda ŝia filino. Kaj tial, Podtoĉina pro la venĝo, decidis ion difekti sur li. Eble ŝi dungis iujn sorĉistinojn kaj la lastaj iamaniere ensorĉis lian nazon. La nazo laŭ opinio de Kovalev tute ne povis esti detrancita, ĉar ne-niu eniris en lian ĉambron; kaj la barbiro Johano Jakovleviĉ razis lin jam pasintan merkredon kaj en daŭro de l'tuta merkredo kaj ankaŭ jaŭdo, lia nazo estis sur sia loko, —almenaŭ tion membris Kovalev, kaj krom tio li tute ne sentis doloron, kaj sendube la vundo siaflanke ankaŭ ne povis tiel baldaŭ saniĝi kaj glatiĝi, se la nazo efektive estus detrancita.

Pensante tiamaniere, li tamen hezitis: ĉu alvoki Podtoĉinan al juĝo laŭ formala ordo, aŭ iri al ŝi rekte kaj kulpiĝi ŝin neatende. Liaj pensajoj subite estis interrompitaj dank, al lumo, kiu ekbrilis tra ĉiuj truetoj de l' porde kaj kvazaŭ anoncis al li, ke kandeloj jam estis bruligita de Johano en antaŭĉambro. Baldaŭ eniris en la ĉambron mem Johano kaj, portante la bruligitan kandelon, li hele lumigis la tutan ĉambron. Unuafere Kovalev prenis la naztukon kaj kaŝis per ĝi la glatan lokon, kie hieraŭ ankoraŭ montriĝis la nazo, ĉar li timis ke lia servisto ne ekmiru ekvidinte ĉe sia mastro la mirindan strangajon.

Apenaŭ Johano foriris en sian ĉambron, kiel subite Kovalev ekatidis iun nekonatan voĉon en antaŭĉambro: «ĉu ĉi-tie loĝas kolegia asosoro Kovalev?»

«Eniru! majoro Kovalev loĝas ĉi-tie,» respondis mem Kovalev, rapide malleviginte de l' apogseĝo kaj malfermante la pordon.

En la ĉambron eniris unu polica oficisto de bona eksteraĵo, kun vangharoj ne sufiĉe blankaj kaj nigretaj, sed kun sufiĉe dikaj vangoj, nome tiu sa-

ma oficisto, kiu en la komenco de l' rakonto staris en la fino de Isaakievskij ponto.

Elrulis V. Gogitiĉe.

(Daŭrigota)



Eterna gloro

Jen

Tien,

Al celo,

Al la bela

Lum'—libereco,

Al paco—justeco,

Al vero ni konstante

Tendencadas esperante:

Ke iam el densa mallumo

Supreniros suno radiluma,

Ekstermos ĝi por ĉiam la militon,

Ekvekos de dormo de l'sklavoj spiriton.

Pereos malpaco, malbono, malamo;

Nacioj unuigos en la amo

Kaj forjetos de l' humer' suferon

Homaro salutos surteran

Paradizon bonoplanan,

Triumfos ĝi solenon.

Kaj regos eterna

La gloro certa

En homrondo

De l'mondo

Tiam

Jam.

Ŝrind



L U R - D A - L U R

(Kurda poemo)

de Vrtanes Papazjan

Tie, sur belegaj bordoj de Nigra-akvo vivis Haso.

Li estis ĉarma kaj bravega junulo de tiu lando. Neniu povis senarmigi lin. Rabisto ne kuragiĝis ĉirkaŭiri lian brutaron, kaj eĉ lupoj—alpaŝi proksime de ŝafo. Ju pli Haso estis bonkora al la hono, des pli li estis senkompata al la malbono.

Li estis ĉarma, belega, kiel eliranta suno. La knabinoj freneziĝis vidante lin. Sed lia ludo! La sonojn, elirantajn el lia ŝalmo, ĉu povis havi eĉ anĝeloj? Tiel ili estis allogantaj kaj amuŝantaj. Sonoj, kiuj fluis melankolie, murmuris kiel kvietaj rivereto, kaj kantis kiel enamiginta najtingalo.

Homo aŭ besto aŭdinte tiujn sonojn alproksimiĝadis nevole, ŝtoniĝadis kaj penadis perdi nenium noton kaj trilon.

Sidadis Haso sur ŝtonegoj, turnadis okulojn al vasta horizonto; Nigra-akvo fluis zigzage malsupre de liaj piedoj, malvarmeta zefiro ludis sur lia frunto...

Kaj li ludis.

Oni devis vidi, kiel tiu malsaĝa ŝafaro, forgesinte manĝi; alproksimiĝadis.

Haso tremigis ŝtonojn, ekscitis la ondojn de Nigra-akvo, ŝtonigis la naturon, plorigis ia zefiron, movis ĉion, ekscitis envion de anĝeloj.

Tia estis Haso.

Kiel do la ŝafoj povis ne obei la sonojn de lia kanto?

Li mem ne moviĝis el sia loko, sed la ŝafaron per muziko alvokis al si.

Li ludis „Berik“—on por paŝti, „Ĥozat“—on por trinkiĝi, kaj „Alvokon de ŝafo“ por ĉirkaŭkolekti humilan brutaron.

La ŝafoj tuj kiam aŭdis ĝin, forlasis kaj pasis ĉion, venis kaj ĉirkaŭkolektiĝis Hason.

Vivis Haso feliĉe, malproksime de homoj, en la brusto de la naturo kaj de la montoj. Li estis filiĉa kiel princo, amata de sia brutaro, dediĉita al sia kanto.

* *

Sed unu tagon Haso ekvidis la solan filinon de la granda sinjoro. Ekvidis li kaj ekamis.

Belega estis Zalhe. Ŝiaj okuloj estis sortantaj, la korpo—altkreska, la brovoj—arkaj, la vangoj—molaj kaj dolĉaj.

Ŝi ankaŭ ekvidis Hason, ŝi ankaŭ ekamis lin. Haso tre malĝojegis. Li perdis viglecon, perdis gajecon. Dum multaj tagoj li vagadis ĉirkaŭ la palaco, kvankam la ŝafaro ne trovadis tie herbon por manĝi.

Turninte la okulojn al la turo li ludis malĝojege, metis sian koron en la ŝalmon kaj ploretis:

Zalhe ankaŭ suferis. Kaŝiginte post la kurteno ŝi ne forigis l'okulojn de Haso kaj l'orelojn de lia ludo. Ŝi nek manĝis, nek trinkis, sed sole suferis.

Ili ambaŭ sciis ke ili estas tre malproksimaj unu de alia, ke filino de grandsinjoro ne povas esti edzino de paŝtisto.

Sed amo estas fajro de Dio, tre forta fajro. Ĝi tranĉas kaj trapasas ĉian malproksimecon.

Amo konas nek malproksimecon, nek diferencon.

* *

La grandsinjoro estis malproksiminda kaj tre ruza. Baldaŭ li rimarkis l'amon de Haso. Li ekkoleris, indignis, volis mortigi la arogantan paŝtiston, sed li estis prudenta. Li ne volis malalitiĝi por eterne la nomon de sia hejmo

kaj vane esti kaŭzo de morto de uuu pastisto.

Sed kion oni dirus, se sciuss, ke iu pastistaĉo enamigis en lian filinon? Oni devas forigi Hason, tiel, kvazaŭ li foriĝas memvole, sed... ofero de ruĝo. Oni devas aranĝi tian ludon, ke Haso forigu li mem kaj ne revenu denove tiujn-ĉi landojn.

Ekmeditis la grandsinjoro, pensis longe kaj trovis rimedon.

Li alvokigis Hason kaj diris al li.

—Mi scias, Haso, diris la malbona grandsinjoro: mi scias, ke vi amas mian filinon. Vi estas bravega junulo; mi estas aŭdinta ki vi ludas bone ŝalmon. Mi donas al vi mian filinon, sed mi proponos jenau kondiĉon:

Mi estas aŭdinta, ke tuta ŝafaro ob-eas vin kaj allogitaj je sono de via ŝalmo aliras al vi.

«Mi metigos lignan ŝtuparon de mal-supre ĝis la tiu alta turo; ĉu vi vidas ĝin? vi sidos tie, supre, sed la ŝafoj kolektigas malsupre. Jen estas kondiĉo: Se vi desupre, ludante la ŝalmon, povos la ŝafaron laŭ la ŝtuparo suprenirigi al vi, tiam mia filino estos via, prenu kaj ĝuu.

Alie, estu malhonorita, kolektu tutan vian havajon kaj dum estas frue, foriru el niaj landoj. Pastistaĉo ne povas esti bofilo de grandsinjoro, ĉesu pensi tion»...

Haso ridetis, klinigis la kapon.

—Estu, nia Mastro, grandsinjoro! Mi konsentas.

* * *

Kaj faris la grandsinjoro la lignan ŝtuparon. Ĝi havis naŭdeknaŭ ŝtupojn. Sekrete de Haso, li rompis unu de meza ŝtupoj: la rompitan ŝtupon li tiamaniere metis en sian lokon, ke vidigis nenio; sed malgranda premeto estus sufiĉe por forĵeti ĝin kaj lasi grandaŭ spacon inter du ŝtupoj. Tia-

maniere supreniro de la ŝafaro estus ne-ebra. Ho! la grandsinjoro estis malbonkora; li estis fiera, tre fiera...

Li faris tian malhonoron.

Supreniris Haso sur la turon, kaj Zalte—sur la balkonon.

Kaj diris la grandsinjoro al Haso:

—Jen estas Zalte, kuragiĝu; ŝi estos tute via, se vi plenumos tion, kion mi diris».

Zalte ekvidis Hason, ekridetis lin, ekruĝigis kaj faris signon. Eksciis la pastisto, ke Zalte ankaŭ amas lin. La koro plenigis de ĝojo. Li prenis la ŝalmon, meits en la buŝon, klinis „kĵoloz“-on*), komercis ludi.

Ektondris montoj kaj valoj, ekmoviĝis arboj, ektermis ŝtonoj. Ekscitigis la malbona grandsinjoro kaj frenoza Zalte, ŝi volis flugi, malsupreniri, kaj, kiel la ŝafoj, fali antaŭ la piedoj de Haso.

Ekmoviĝis ankaŭ la ŝafaro, proksimigis al la ŝtuparo kaj komencis unu post alia supreniri al la turo.

El armena lingvo tradukis

S. Hajjan

KOMPATINDA ĈERVO

(el Ĉavĉavadze)

Kiel oni diras: „pasia ĉasamanto“, ĝuste tia estas mi. Mirinde mi amas sidi sub arbo en densa silenta arbaro kaj atendi kun maltrankvie batanta koro jam rimarkitan ĉasajon. En tiu ĉi ne tediga amuzo, vi sentas ian misteran, neordinaran plezuron. Sed se vi volas, mi diras ankaŭ, ke la ĉasado estas peko kaj ĉe tio ĉi ne malgranda peko. Ĉiu estaĵo estas kreita de Dio,

*) Kurda kapvesto.


ĉiuj vivaj kreitaĵoj havas egalan rajton vivi en tiu ĉi necirkafrigardebla mondo. Sed kion vi faras? Do ne vane certigas la Sankta Skribo, ke la unua senpeka homa sango estis versita de la homo mem; la homo estas sangavida kaj mi ankaŭ estas unu el tiuj ĉi homoj. Multfoje mi estas vidinta cervon timigitan de ĉashundoj, multfoje ĝia beleco forprenis mian konscion. Trametinte siajn trunkajn kornojn tra la dorso, kuras ĝi rapidege bela kaj fera, postbojata de lertaj hundoj. Ho, mizeraj, ĝi forkuras de la hundoj, sed subite trafas homon kiu en tia okaso estas ne malpli senkompata ol la hundoj. La sperta ĉasisto aŭdas piedfrapadon jam de malproksime kaj lia sangavida koro pli pli ekscitiĝas per troa senpacienco. Jen, alproksimiĝis je interspaco de pafado, inter arbitaĵoj montriĝis ĝia malgaja vizaĝo. La hundoj persekutas. La cervo etendas siajn piedojn kaj saltas trans la arbitaĵoj kiel sago. Vi pensas, ke jen ĝi tuj preterkuros kaj donos sin al la atencoplana, arbara libereco, sed ne! Vi ektaĵas kaj vidu kiel ĝi tuj haltas, kun kiaj belegaj gestoj komencas movi la kolon, kiel malespere komencas rigardi per siaj malgajaj okuloj senĉese movetante la orelojn kaj flari per larĝiĝintaj naztruoj! Ĝi estas tiel bela, tiel delikata kaj allogema, ke vi pensas, ke ĝi nun estas kolektinta ĉiujn bonojn donacitajn de l' naturo, por ke per tio ĉi ĝi povu movigi la homan koron kaj savi sin de l' malamiko; sed vane, la homo tute ne estas tiom bonanima, ke li trompiĝu tiel facile. Flarinte la besto eksentas homan odoron kaj tuj intencas kuri aliflanken, sed tiutempe ektondas pafilo kaj estinte ĝis nun viva kaj libera ĝi sterniĝas sur la herboj en arbaro, kie ĝi unue malfermis la okulojn por saluti la belegan naturon

kaj nun fermis ilin por adiaŭti la lastan fojon; tiuj ĉi herboj estis ĝia lulilo kaj nun aliformiĝis ie tombo. Se vi vidus kiel trankvile kaj senĝeme mortas tiu ĉi senpeka estaĵo... Sed mi en ĝiaj larmoplenaj okuloj estis leginta jenon: „Mia mortiginto! la mondo ja estas granda kaj vasta... Kial vi envidis por mi manplaton da tero, kiun mi, paca, sendanĝera besto, posedis en tiu ĉi nemezurebla Dia mondo?... Tiuj ĉi vortoj malĝojigis mian koron, ĝis la tero estis ensorbinta la sangon kiun mi disverŝis. Kaj poste, kiam la sango malaperis, mi ankaŭ rememoris, ke ni homoj estante reĝoj de ĉiuj superteraj ekzistaĵoj, superuloj de ĉiuj kreitaĵoj, ni havantoj Dian formon, ne cedas unu al alia pecon da tero sen ia sangverŝo. Kaj kiam mi enpensiĝis kaj rememoris, ke oni ne povas meti eĉ unu piedon sur la tero, kie ne estus versite la homa sango, min koro iom post iom komencis trankviliĝi kaj mi pravigante diris mi: Tamen estas bone, mia besto ke vi mortas tie, kie vi naskiĝis. Al ni, homoj, ofte mankas eĉ tiu feliĉo.

El kartvela lingvo tradukis

D. Ciskarauli.

Vladikaŭkaz.



ĈEVALA NOMO

De A. Ĉeĥov.

La dentoj de la eksgeneralmajoro Budlejev ekdoloris. Li gargaris sian buŝon per brando, konjako, metis sur la dalorantan denton tabakan fumajon, opion terebinton, petrolon, ŝmiris la vangon per jodo, en siaj oreloj li havis vaton, trempitan en alkoholo, sed ĉi tio aŭ ne helpis aŭ naŭzigis. Venis doktoro. Li purigis ion en la dento, ordonis uzi ki-

ninon, sed ankaŭ tio ne helpis. Oni proponis al la generalo fortiri la denton, sed li rifuzis. La tuta familio—edzino, infanoj, servantoj kaj eĉ la kuristeto Peĉjo—proponadis siajn rimedojn. La bienadministranto de Budlejev—Ivan Jevsejiĉ, ankaŭ venis kaj konsilis al la generalo kuraci la denton per sorĉrimedo.

—En nia distrikto, via generala moŝto,—diris li,—antaŭ dek jaroj servis akizoficisto Jakov Vasiljiĉ. Sorĉante li tre bone sanigis dentojn. Iafoje li turnis sin al la fenestro, ion murmuretis, kraĉis kaj sanigis kvazaŭ per manekmovo. Tia mirinda forto estas al li donita...

—Kie nun li estas?

—En Saratov, ĉe sia bopatrino. Kiam li estis eksigita de la akvizposteno, li tie loĝigis kaj nun li nutrigas nur dank' al dentoj. Se ekdoloras ies dentoj, tuj oni iras ĉe lin kaj li helpas... La saratovanojn li akceptas ĉe si dome, kaj la aliurbanojn li kuracas telegrafe. Sendu do al li depeŝon, via generala moŝto, kaj skribu, ke la dentoj de l'Dia sklavo Aleksij doloras, kaj vi petas helpon. Kaj la monon por la kurado vi sendu poŝte.

—Mensogajo, friponajo!

—Sed vi tamen provu, via generala moŝto. Kvankam li ŝatas brandon, estas insultulo, loĝas ne kun sia edzino sed kun germanino, tamen oni povas diri, ke li estas sinjoro, mirinde helpanta!

—Sendu, Aleksĉjo,—petegis la generalledzino.—Jen vi ne fidas la sorĉon, sed mi ĝin mem provis. Kvankam vi ne kredas, sed kial ni ne sendu? Vi ne perdos do la manojn pro tio.

—Nu bone,—konsentis Budlejev.—Mi estas en tia malbona farto, ke mi eĉ al diablo sendos depeŝon, ne nur al akvizoficisto... Oh! mi ne havas plu

forton! Nu, kie loĝas via akvizoficisto? Kion mi devas al li skribi!

La generalo sidigis al la tablo kaj prenis plumon en la plumon.

—En Saratov lin ĉiu hundo konas,—diris la bienadministranto.—Skribu, via generala moŝto, en urbon Saratov, jes... Al lia moŝto, sinjoro Jakov Vasiljiĉ...

—Nu?

—Vasiljiĉ... al Jakov Vasiljiĉ... kaj kiel nomata el estas laŭ familio?... Jen, mi forgesis la nomon!... Vasiljiĉ... Diablo... Kia do estas lia familia nomo! Dum mi venis ĉi tien, mi memoris... Permesu...

Ivan Jevsejiĉ turnis siajn okulojn al la plafono kaj ekmovetis la lipojn. Budlejev kaj lia edzino senpacience atendis.

—Nu, kio? Pensu rapide!

—Tuj... Vasiljiĉ... al Jakov Vasiljiĉ... Mi forgesis! Sed estas tia simpla nomo... Tre similas al ĉevala... Ĉevalin-in?*) Ne, ne Ĉevalin-in. Atendu... Ĉu Ĉevalid-ov? Ne, ankaŭ ne Ĉevalid-ov. Mi bone memoras, la nomo estas ĉevala, sed ĝi tute forflugis el mia kapo...

—Ĉevalid-jatnikov?

—Tute ne! atendu... Ĉevalin-icin... Ĉevalin-jatnikov... Hund-jatnikov...

—Ĝi ja estas hunda, sed ne ĉevala. Ĉevalid-ĉikov!

—Ne, ankaŭ ne Ĉevalid-ĉikov... Ĉeval-inin... Ĉeval-kov... Ĉevalid-kin... Ne, ne tiel!..

—Nu, kiel mi devas al li skribi! Vi pensu!

—Tuj. Ĉeval-kin... Ĉevalin-kin... Timonĉeval-ov...

—Timonĉelal-nikov? demandis la generalledzino.

*) Antaŭ la streko estas skribita la traduko de rusa vorto, kaj post la streko—la finaĵo de familia nomo.

—Tute ne. Flankĉeval-kin... Ne, ne tiel! Mi forgesis!

—Kial do vi venas konsili, se vi forgesis! Diablo vin prenu! ekkoleris la generalo.—Iru for!

Ivan Jevsejiĉ malrapide eliris kaj la generalo metis sian manon sur la vangon kaj ekmarŝis en la ĉambroj.

—Oh, mia patro! —ĝemis li.—Oh, patrino! Oh la luman mondon mi ne vidas.

La bienadministranto iris en la ĝardenon kaj, turninte siajn okulojn al la ĉielo, penis rememori la nomon de la ĉakcizoficisto:

—Ĉevalid-ĉikov... Ĉevalid-kovskij... Ĉevalin-janskij...

Iom poste oni alvokis lin al la ĝesinjoroj.

—Ĉu vi rememoris? demandis la generalo.

—Tute ne, via generala moŝto.

—Eble Ĉeval. janskij? Ĉeval-nikov? Ĉu ne?

Ĉiuj domanoj senfine elpensadis nomojn. Oni jam nomis ĉiujn aĝojn kaj gentojn de ĉevaloj. Oni rememoris ankaŭ la kolharojn, huifojn, jungilaron... En la domo, ĝardeno, servantejo kaj kuirejo ĉiuj iradis de unu angulo al alia kaj serĉis la nomon, frotante al si la frunton...

La bienadministrantou ĉiuminute oni vokadis en la domon.

—Ĉevalar—ov? ni lin demandis.—Huf—in? Ĉevalid—ovskij?

—Tute ne,—respondis Ivan Jevsejiĉ kaj, suprenturnante la okulojn li daŭris apenaŭ aŭdeble:

—Ĉeval-enko... Ĉeval-ĉenko... Ĉevalid-ejev...

Ĉevalin-ejev...

—Paĉjo, oni kriis el la infanejo, —Ĉevaltri-in! Bridet-kin!

La tuta bieno estis vekita. La senpacienca, elturmentita generalo prome-

sis doni kvin rublojn al tiu, kiu rememoros la veran nomon; jen tial Ivan Jevsejiĉ-on sekvis tutaj homamasoj...

—Brunĉeval-ov!.. oni diris al li.—Trot-istkij! Ĉeval-ickij!

Jam vesperigis, sed la nomo ankoraŭ ne estis trovita. Kaj ne sendinte telegramon, oni enlitigis.

La generalo ne dormis la tutan nokton. Li marŝis de unu angulo al alia kaj ĝemis... Je la tria matene, apenaŭ tagiĝis, li eliris al la domo kaj ekfrapis la pordon de l'bienadministranto.

—Ĉu Ĉevalvir-ov?—demandis li plorante voĉe.

—Ne, ne Ĉevalvir-ov, via generala moŝto,—respondis Ivan Jevsejiĉ kaj ekĝemis, kvazaŭ li estus kulpa.

—Eble la nomo tute ne estas ĉevala, sed ia alia!

—Vere mi diras, via generala moŝto, ĉevala ĝi estas... Tion mi bonege memoras.

—Kiom senmemora vi estas, fratulo... Por mi tiu-ĉi nomo estas pli kara ol ĉio en la mondo. Mi la finturmentigis! Matene li ree venis la doktoron.

—Nu, li fortiru!—decidis la generalo.—Mi ne havas plu forton toleri...

La doktoro venis kaj fortiris la malŝanan denton. Tuj la generalo trankviligis. Farinte sian aferon kaj ricevinte sian honoraron, la doktoro sidigis en sian kaleŝon kaj veturis domon. Post la pordego en la kampo li renkontis Ivan Jevsejiĉ-on... Li staris apud vojo kaj rigardante koncentriginte malsurpen, pensis. Laŭ la sulkoj sur lia frunto kaj la esprimo de liaj okuloj oni povis kompreni, ke liaj pensoj estis streĉitaj, turmentigaj....

—Flavĉeval—ov, Selfarist—ov... murmuretis li, Jungil—ov, Ĉeval-skij...

—Ivan Jevsejiĉ! sin turnis la doktoro al li.—Ĉu mi povas, mia kara, aĉeti de vi kvin buŝelojn da aveno!

Miaj vilaĝanoj vendas al mi avenon, sed tre malbonan...

Ivan Jevsejiĉ strange rigardis la doktoron, ekridetis iel savaĝe, kaj ne respondinte eĉ vorton, li ekplatiĉis per manoj kaj ekkuris al la bicno tiel rapide, kvazaŭ malantaŭ li kurus rabia hundo.

—Mi rememoris, via generala moŝto —ekkriis li goje, nesiavoĉe, enkurante la kabineton de la generalo.—Mi rememoris, Dio gardu la doktoron sana! Aven-ov, Aven-ov estas la nomo de l' akcizoficito! Avenov, via generala moŝto! sendu la depeŝon al Avenov.

—Foriru!—diris la generalo malame kaj proksimigis al lia vizaĝo du pugnoj. Mi, ne bezonas plu vian ĉevalan nomon! Iru for!..

El la rusa lingvo tradukis.

Vardansirunĝans

La grupoj forflugas.

La grupoj	Kaj koro
Kun bruoj	Dolora
Trafugas en nuboj	En tiu ĉi horo
Kaj kune	Sopiras,
Enue	Deliras
Sciigas atunon.	Pri frua foriro
Cielo	De bela
Malhela	De hela
Per akra orelo	Printempo florp-
Iliajn	lena,
Mistikajn	De varma
Aŭskultas kant-	De ĉarma
kriojn.	Somero alarma...
La vento	Kaj laŭte
Atenta	Senhalte
Sen la atendo	En nuboj kantante
Disportas	La birdoj
Senvortajn	Rapidaj
La voĉojn per for-	Forflugis per flir-
to...	to...

Ŝrind

LA CENTJARA SENDEPENDECO DE ĈILUJO

La 18^an de Septembro de la nuna Jaro Ĉila Respubliko plenumas sian unuan centjaron de sendependeco. Por solenigi ĉi tiun gloran datrevenon la Ĉila Registaro, kaj la oficialaj institucioj preparas grandajn festojn al kiuj estas invititaj la registaroj de Eŭropo kaj Ameriko.

Profitante ĉi tiun okazon, Ĉila Esperantista Asocio decidis efektiviĝi Esperanto-Kongreson.

Ni esperas pro la ĉeesto en ĉi tiu ĉefurbo de multenombraj ekster kaj samlanduloj, atingi gravan sukceson por la propagando de nia lingvo.

Ĉila Esperantista Asocio aŭkaŭ decidis malfermi dum la festoj, Esperantan Ekspozicion por aktivigi la propagandon kaj vidigi la grandajn progresojn faratajn de Esperanto en ĉiuj partoj de la mondo.

Por trafi la dezirindan rezultaton ni bezonas la helpon de niaj ĉiulandaj samideanoj, de la gazetoj, komercistoj, industriistoj, k. c.

Ni, do, petegas al ili bonvolu partopreni en la propagando de nia kara lingvo sendante por la ekspozicio ĉiusepacajn esperantaĵojn, t. e. gazetojn, librojn, komercaĵojn, aŭ ian ajn propagandilon.

Ni antaŭdankas al ĉiuj, kiuj malavare volos helpi nian entreprenon.

La Esperanto—Ekspozicio daŭros ĝis la fino de l'jaro, sed ni varme petas al niaj samcelanoj sendi ĉiusepacajn esperantaĵojn kiel eble plej baldaŭ, per la jena adreso:

Santiago de Ĉile
Casilla 728

La komitato de Ĉila Esperantista Asocio

Por pliaj sciigoj legu nian revuon «La Du Steloj», oficiala organo de Ĉ. E. A.

Институтъ Эсперанто

(Москва, Лубянский провъздъ, 3)

Общія положенія.

1) Институтъ Эсперанто имѣетъ своею задачею дать желающимъ возможность изучить какъ теоретически, такъ и практически международный вспомогательный языкъ Эсперанто, въ цѣляхъ примѣненія его въ различныхъ сферахъ общественной жизни.

2) Институтъ находится въ вѣдѣніи Министерства Народнаго Просвѣщенія и дѣйствуетъ на основаніи правилъ объ урокахъ и курсахъ для взрослыхъ, утв. г. Мин. Народнаго Просвѣщенія 20 марта 1907 года. Учредителемъ и распорядителемъ Института состоитъ Надворный Свѣтникъ Александръ Андреевичъ Самаровъ.

3) Системой преподаванія въ Институтѣ и внутреннимъ распорядкомъ вѣдаетъ учредитель Института совместно съ Педагогическимъ Совѣтомъ, состоящимъ изъ всѣхъ преподавателей Института.

4) Правомъ поступленія на курсы Института пользуются лица обоего пола безъ различія сословія и вѣрнопреданія; представленія для того какихъ-либо документовъ и свидѣтельствъ объ образованіи не требуется.

5) Запись на курсы производится въ теченіе всего года.

6) Занятія въ Институтѣ ведутся по группамъ, въ зависимости отъ степени подготовки слушателей.

7) Въ Институтѣ ведутся курсы двоякаго рода: элементарные и спеціальныя. Элементарные курсы языка Эс-

перанто продолжаются приблизительно при двухъ урокахъ въ недѣлю, отъ двухъ до трехъ мѣсяцевъ (16—24 уроковъ). Спеціальныя курсы преподаются по особой программѣ, вырабатываемой Педагогическимъ Совѣтомъ и преимущественно для лицъ, которые въ будущемъ пожелаю бы преподавать языкъ Эсперанто.

8) На 1910—1911-й годъ плата за слушаніе курсовъ въ группахъ определена 4 рубля въ мѣсяцъ, считая два полуторачасовыхъ урока въ недѣлю. За отдѣльныя занятія плата устанавливается по соглашенію.

9) Плата за слушаніе курсовъ вносится за мѣсяцъ впередъ и возврату не подлежитъ.

10) Лицамъ, прошедшимъ полный курсъ языка Эсперанто въ предѣлахъ принятыхъ программъ, Институтъ, въ случаѣ заявленнаго желанія, можетъ, послѣ производства испытанія, выдавать соотвѣтствующія свидѣтельства.

11) Названныя свидѣтельства выдаются двоякаго рода: 1) свидѣтельства объ элементарномъ знаніи Эсперанто и 2) свидѣтельства о прохожденіи спеціальныхъ курсовъ, удостоверяющія знакомства съ предметами, необходимыми для преподаванія языка Эсперанто.

12) Желающіе подвергнуться испытанію на полученіе свидѣтельства объ элементарномъ знаніи Эсперанто, уплачиваютъ въ пользу Института пять рублей (5 р.), а на полученіе свидѣтельства о прохожденіи спеціальныхъ курсовъ десять рублей (10 р.). Лицамъ, не выдержавшимъ испытанія, представляется по истеченіи 3 мѣсяцевъ возобновить таковое безъ особой за то платы.

13) Программы курсовъ и распредѣленіе занятій въ группахъ устанавливается Педагогическимъ Совѣтомъ Института.



HUMORAĴOJ

—Kion vi manĝis hodiaŭ?

—Nenion.

—Ho, feliĉa vi estas! Sed mi eĉ la «nenion» ne manĝis.

**

—Ĉu vi povas ludi fortepianon kvarmane?

—Pardonu! Mi ne estas simio!.

**

—Kial do vi faris falsajn mionbiletojn?!

—Sed konsentu vi mem, sinjor' juĝanto, ke verajn oni neniel povas fari...

**

—La aĉetonto.—Sinjoro! ĝi do estas mia biciklo!... Tiu sama, kiun oni ŝtelis de mi antaŭ du monatoj!..

—La vendisto.—Via biciklo!.. Diru mi petas... Kiamaniere vi, sinjoro, povas rekoni vian bicikleton, se mi ĝin kolorigis denove?!

**

—Miĉjo, kion faris kun vi la doktoro?

—Nenion... Li nur rigardis mian langon...

—Vian langon!.. Nu, fratulo, ankaŭ mi povus... rigardi vian langon...

Esperantigis V. S.

BIBLIOGRAFIO

Noto pri la Inicilo Matematika, Jacques Camescasse (Ĵak Kameskas). Paris, Librejo Hachette kaj K_o 1910. Prezo Sm. O. 40.

Jam delonge estas sentata, ke la instruado de tiuj sciencoj devas esti nepre objekta. Lernantoj, precipe infanoj, komprenas plibone la klarigojn plejparte tiam, kiam ili vidas antaŭ si tion, pri kio oni parolas. Tial oni devas instrui sciencojn ne kiel ion abstraktan, sed kiel konkretajn, kiel ion, kio havas praktikan aplikon.

La aŭtoro de la „Inicilo“ protestas, ekzemple, kontraŭ la instruado de la Historio en la unuaj jaroj de lernado. Li rakontas sekvantan fakton:

«Antaŭ kelkaj monatoj, en Parizo, mi aŭdis knabeton sepparan, lernanto de lernejo unuagrada urba, kiu eldiris parkere, sub la vigla kontrolo de sia patrino, lecionon historian, en kiu estis parolata pri la kunvenoj de la Ĝeneralaj Klasoj de 1614. Mi demandis: „Ĉu ci scias, kio estas la kunvenoj de la Ĝeneralaj Klasoj?“

La knabeto ĉesis paroli, rigardis la plafonon, kaj diris: „Ha! mi plu ne scias! Tamen li sciis la lecionon parkere, li ricevis la unuan premion de Historio, je la fino de la jaro. Por kia utilo?“

Tiu ĉi fakto notigas min alian fakton:

Antaŭ nelonge mi bezonis scii la latinan vorton „jes“. Mi ne scias, eble ĝi eĉ ne ekzistas en la latina lingvo, ĉar mi ne trovis ĝin en la vortaro, kiun mi havis. Sed la afero estas, ke tiun ĉi vorton sciis neniu, kiun mi demandis: inter la demanditoj estis lernantoj jam de la lastaj klasoj de gimnazio (en la gimnazio la lecionoj de la latina lingvo estas ĉiutage dum 6 ja-

roj) kaj eĉ fininto universitaton. La jeno montras, kiol seke estas instruataj kelkaj (aŭ eble multaj...) sciencoj ankaŭ en la duagradaj lernejoj. Kvan-
kam la latina lingvo ne havas ian signifon por la ĉiutaga vivo, tamen oni povus fari ĝian instruadon iom pli interesa por faciligi ĝian lernadon...

Inter la sciencoj la matematiko estas la plej disvastigita, ĉar ĝi estas «en la fundamento de ĉiuj sciencoj de ĉiuj metioj, de ĉiuj niaj okupadoj. Senĉese ni bezonas kalkuli kaj mezuri. La matematiko estas necesa fundamento de ĉia instruo». La matematikon oni instruas de la unuaj jaroj de la lernado. Tial, por ke ĝi estu pli bone komprenebla kaj pli interesplena, oni objektigu ĝin. Tion ebligas la Inicilo Matematika. Ĝi estas ludo konsistanta el 1200 kunigeblaj kuboĵoj, per kiuj oni povas klarigi multon el Aritmetiko, Algebro kaj Geometrio. «La Inicilo Matematika prezentas tri ecojn karakterizajn: A.—Ĝi konigas samtempe: la principojn de la Nombrado Dekuma, la formojn geometriajn elementajn (do: la Sistemon Metran); B.—La maniero uzi ĝin estas facila; la objektaro estas simpla: nur du specoj da objektaj por fari multajn kombinojn; C.—Ĝi ebligas la kontrolon tujan, aŭtomatan (se tiel oni povas diri) de la kombinoj faritaj. Ĉiu eraro estas montrata aŭ per manko, aŭ per troo. Por tiu rapideco de kontrolo la Inicilo Matematika faciligas la metodon objektan en la multenombraj lernejoj».

Ni rekomendas la Inicilon kiel, bonan ilon por facile instrui la Matematikon en familioj kaj lernejoj.

Vardan Sirunjan.

KRONIKO

Dum la dua duono de Aŭgusto 1911 en Antverpeno (Belglando) oni aranĝis la Sepan Tutmondan Esperantistan Kongreson.

Paris, 31 an de Septembro 1910.

Estimataj Sinjoroj:

Milfoje ni dankas Vin pro la tradukoj el Katkazaj lingvoj kelkajn rakontetojn, kiuj al ni tre plaĉis kaj per kiuj nunfoje ni ekscias pri la ekzistado de bela literaturo ĉe la Katkazaj popoloj: armenoj, kaj aliaj... Vere dank' al Esperanto ni, Eŭropanoj, konatiĝas kun Literaturo ĝis nun nekognata al ni kaj ni vidas, ke vi noble laboras kaj penados tra la mondo disvastigadi la armenan kaj aliajn literaturojn per Esperanto.

Ni tiam, kiam aperas novaj rakontoj en Via bela kaj por ni per tre stangaj literoj jurnaĵeto, legas kun granda intereso.

Ni deziras grandan sukceson al via entrepreno.

Kun estimo malriĉaj gelaboristoj:

F-ino R. Rollin,
Marie Lejte
S-o Locher,
Alfred Merusnie.

Redaktoro-Eldonisto

H. Ter- Astvacatrujauc

Анонсој

Въ редакцій журнала „Кавказский
Эсперантистъ“, Елизаветинская ул.
№ 17, продаются слѣдующія книги:

1. Kato en botoj, tr. de V. Sirun. 10 k.
2. Hundo kaj kato „ „ 10 k.
3. Rondaj Dioj „ „ 3 k.
4. Ekzercar. Esperanta, de V. S. 5 k.
5. Nino, tr. de V. Gogitidze . 3 k.
6. *Դասագիրք հայերանո լիզուի*
Հ. Տէր-Ասողաճարեանի . 25 k.
7. *Բանարան հայերանո-հայե-*
րէն Հ. Տ. Ասողաճարեանի 50 k.
8. Полный учебникъ Эсперан-
то, В. Сирунянъ . 12 k.
10. *Հայերանո միջազգային լի-*
զուի Ա. Օհանջանեանի . 3 k.
11. Esper. Legolibro de A. Fiŝer 30 k.

12. I. Turgenev. Kanto de trium-
fanta amo, tr. A. Fiŝer . 25 k.
13. „ „ Anjo (Ася) tr. de
A. Fiŝer kaj V. Zamjatin . 25 k.
14. Postkartoj kun portreto de L.
Zamenhof po 2 k. 100 eks. 1 r. 70 k.

*При требовании больше 10 экз. дается
20% скидка. Пересылки за счет поку-
пателя.*

Черезъ редакцію можно получить
еще слѣдующія книги:

1. L. L. Zamenhof. Fundamen-
to de Esperanto (gramatiko,
ekzercaro, univers. vortaro) 80 k.
2. Fundamenta krestomatio, de
la lingvo Esperanto . 1 r. 40 k.
3. La Revizoro de Gogol . 60 k.
4. Marta de Orjesko . 1 r. 40 k.

ՄԱՅՍ ԵՅԾԱԻ

„ԱԼԹՈՒՆ ԴԵՐԵՍԻՄ

ԿԱՄ

ԻՐ ԴԻՅԵՐ ԲԵՂԵՑ ԲՈՒՅՈՒՄ“

Դրբայիւ, զինչ 20 և Գումարով 25 յ՞
զեզ. Յանկացողներին խնդրեմ զիմել
տիրիս Գոռտաներբոզ և Եկնարոնա-
կանն զրալանաանոյները կամ Տփիսիս
„ԱՆԴՈՅԵՆ ԵԿԵՂԵՑԻՆ“

Գ. ՇԷՐԵՆՑԻՆ

Тифлисъ, Таядоевская церковь Г.
Шеренцу



Вышла изъ печати книга

счетоводство

ОБЩЕСТВЪ ВЗАИМНАГО КРЕДИТА.

(Полное, по двойной системѣ).

Составилъ **А. Арумовъ**, основатель Второго Тифлискаго О-ва
Взаимнаго Кредита.

Адресъ: Книгоизд. „Коммерческая Литература“, СПб., Екатеринбургскій просп.,
№ 8. 3—3

КНИГИ

для изученія языка

„ЭСПЕРАНТО“

учебники, самоучители, словари — русско-эсперантскіе, эсперанто-русскіе, книги для упражненія и чтенія и зеленые значки продают-

ся въ 0-вѣ „Эсперанто“ при Тифлисской I мужск. гимназіи по воскресеньямъ отъ 10¹/₂—12 ч. дня и по средамъ отъ 7 ч.—9 ч. веч.

„Майкопская Газета“

ежедневная, литературно-политическая и общественно-экономическая.

Годъ изданія 1-й (съ 1910 г.) въ г. Майкопѣ, Куб. обл.

Выходить по программѣ столичныхъ газетъ, особое вниманіе удѣляя вопросамъ промышленнымъ и финансовымъ.

Экономическіе интересы Кубанской области и Майкопской нефтепромышленности будутъ обслуживаться въ „Майкопской газетѣ“ всесторонне.

Собственные корреспонденты во многихъ городахъ Россіи и заграничій. Специальные корреспонденты въ Лондонѣ и Берлинѣ.

Подписка цѣна съ іюля до конца года 3 р. Одѣльный №—3 к.

Такса для объявленій:

На 1-й страницѣ 1 строка пегита—20 к. На 4-й страницѣ 1 строка пегита—10 к. Иногородніе объявленія—30 и 20 коп. строка. Годовымъ и мѣсячнымъ—сидна 50⁰/₁₀₀. Объявленія и предложенія труда по 25 коп.—5 строкъ.

Пріемъ подписки и объявленій производится въ книжномъ магазинѣ Марѣева, Соборная ул. Тамъ же можно переслать и передавать все письма, сообщенія и замѣтки для газеты.

Все переговоры по дѣламъ редакціи, временно, въ магазинѣ Марѣева отъ 11 до 12 ч. дня.

Типографія „ЭСПЕРАНТО“

Елизаветинская ул. № 17.

Принимаетъ всевозможные типографскіе заказы на языкахъ

Эсперанто, русскомъ, французскомъ, арменскомъ, грузинскомъ и пр.

Печатаются: газеты, брошюры, книги, бланки, лешучки, преисъ-куранты, этикетки, и т. д.

Визитныя карточки по самой дешевой цѣнѣ.

Работы исполняются скоро, аккуратно и по самымъ умереннымъ цѣнамъ.

Контора типографіи открыта отъ 8 ч. утра до 8 ч. вечера.

ՏՊԱՐԱՆ „ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ“

ԵԼԻԶԱՅԵՏԻՆՍԿԱՅԱ ՓՈՂՈՑ, № 17.

Ընդունում է ամեն տեսակ պատվերներ

ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ, ՀՈՅՆԻՆ, ՌՍԵՐԻՆ, ՓՐԱՆՍԵՐԻՆ, ՎՐԱՇԵՐԻՆ
ԵՒ ԱՅԼ ԼԵՋՈՒՆԵՐՄԱԸ

ՏՊԱԳՐՈՒՄ է լրագրեր, գրքեր, քրոջիքներ, դասկներ, թուղիկ
յայտարարություններ, պրես-կոլեանտներ, էտիկետներ, հաշիւներ ևն:

ԱՅՑՏՆՈՄՄԵՐՆ ԱՄՆԱՋԵՌՆՏՈՒ ԳՆԵՐՈՎ:

Պատվերները կատարում են **ԱՐԱԳ, ՎԻՅՏ, ՄԱԿՈՒՐ** և ամենա-
չափաւոր գներով:

Ցպարանի գրասենյակը բաց է առ. 8 ժամ. մինչև եր. 8 ժամը:

სტამბა „მსპერანტო“

ელიზავეტინსკაია ქუჩა, № 17.

იღებს ყველა გვარ ზაკაზებს მსპერანტო, რუსულ, ქართულ, სომ-
ხურ, ფრანგულ და სხვა ენებზედ.

ბეჭდავს გაზეთებს, წიგნებს, ბროშურებს, ბლანკებს, ლეტურებს, პრეს-
კურანტებს, ეტიკეტებს, ანგარიშებს და სხ.

ვიზიტინი კარტიკები ხელმისაწვდენ ფასებში.

ზაკაზები სრულდება მსწრაფად და სუფთად დაკლებულ ფასებში.
კანტორა ღიაა დღის 8-დან საღამოს 8 საათამდე.